Universala Esperanto-Asocio

TEJO-temoj

Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara Komuniko: EKO 2015-48 sendita el Roterdamo – urbo kaj flughaveno, la 8an de novembro.*

# La Estraro de TEJO kunsidis kaj laboris tra kvar tagoj

La nova kvinpersona estraro de TEJO okazigis sian unuan laborkunsidon en la Centra Oficejo (CO) en Roterdamo. Ĉiu estrarano ĉeestis, kune kun la surloka TEJO-volontulo, fakulo pri subvencioj, la observanto de UEA, la estonta Ĝenerala Direktoro kaj (por specifaj temoj) la nuna Direktoro. Skajpa kontaktado okazis kun kvino da pliaj kunlaborantoj. Ampleksa tagordo plenigis kvar tagojn, de la 5a ĝis la 8a de novembro 2015. La novan estraron ni prezentis en EKO 2015-39 sendita el Wiesbaden en la 5a de aŭgusto.

La ĵaŭdaj temoj inkluzivis sesion pri team-konstruado gvidata de la nova Direktoro, rilate ĉefe al kurantaj junularaj projektoj kiuj bezonas kunlaboron kun la CO, la evoluigo de la TEJO-retejoj, fajnigo kaj konfirmo pri la taskdisdono en la estraro kaj prepara diskuto pri realigo de la komitata decido pri IJK en Afriko.



Foto: preterpasinto

La vendredaj temoj inkluzivis la pluiron kaj ampleksigon de la programo pri TEJO-volontuloj, ĉu en la CO, ĉu aliloke en la mondo, kun la ligita temo pri kunlaboro kun eŭropaj instancoj (kiel ekzemple EVS – Eŭropa Volontula Servo), kiuj ekzistas por stimuli kaj kontribui finance al volontulaj programoj. Sekvis diskuto pri patronoj de TEJO kaj tre utila horo dediĉita al membrovarbado, specife pri kunlaboro inter TEJO kaj UEA por kreskigi la nombron da junaj membroj. Konstatite, ke pli urĝa ol varbado de novaj membroj (kiuj alvenas ĉiukaze) gravas agi pli forte por reteni la nunajn membrojn. Tiu diskuto naskis dokumenton 1,5-paĝan kiu resumas la ideojn kaj konsentojn; kontraŭ peto ni pretas liveri tiun dokumenton. La kasisto prezentis raporton pri la financa stato de TEJO kaj de la ĵusa Internacia Junulara Kongreso (IJK), kiu liveris pozitivan rezulton. Disktutite, kiel fortigi la ligojn inter estraranoj kaj la komisiitoj de

TEJO, ekzemple pere de Skajpo. La lasta temo estis la dokumentoj de TEJO, kiel stoki ilin, tiel ke ili estu efike alireblaj kaj serĉeblaj.

La sabataj temoj ekis per prezento de Sara Spanò pri la programoj funkciantaj, pere de kiuj TEJO povos fari subvencipetojn, ĉu por subteni administradon, venigo de partoprenantoj al aranĝoj, ĉu por interkontinentaj kapablo-konstruaj projektoj. Speciala gasto por la ĉefa diskuto pri la okazigo de la unua IJK en Afriko estis s-ino Ans Bakker el Amsterdamo – kun aldona temo pri subteno pere de TEJO por la 6a Afrika Kongreso de Esperanto en Rumonge, Burundo en la sekva aŭgusto.

Diskutite ankaŭ estis la sekva IJK en Vroclavo, kies alloga informilo jam aperis, kun skankodo fine, kiu gvidas al la koncerna retpaĝaro. La estraro okazigis skajpsesion kun la prizorganto de Pasporta Servo, kaj alian kun TEJO-anoj, tiel ke ili povu starigi demandojn aŭ fari proponojn. Estis ankaŭ anoncita similcela 'malferma horo'. Okazis tagfine unuhora komuna skajpa kunsido kun la estraroj de TEJO kaj UEA – ja abundas nuntempe gravaj komunaj temoj – nelaste reformo de la membrosistemo kaj la modifado de la bazaj dokumentoj de TEJO cele al sendependiĝo – diskutita surbaze de ĵus ricevita komentaro de nederlanda notario.

La dimanĉaj temoj inkluzivis la komitaton de TEJO, rilatoj kun Landaj Sekcioj, servoj dum renkontiĝoj, la prizorgo de la informilo TEJO-Tutmonde, la projektoj Trampolino (subteno por etaj projektoj), Kodejo (kolektejo de informoj pri E-organizoj – ekz. Landaj Sekcioj) kaj la fikso de dato kaj loko por la sekva estrarkunsido de TEJO, kiu okazos post ĉ. ses monatoj.

Stefan MacGill, observanto de UEA
Michael Boris Mandirola, prezidanto de TEJO

Vortoj 535

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Se vi volas vidi pli malnovajn komunikojn iru al: http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA,_FA...

PDF kreita de Nuance Power PDF.

Postaldonitaj fotoj de Juliana Evandro: Dum skajpado kun la estraro de UEA; la nova kasisto de TEJO.



